


**DR. SALGA  
ATTILA**

**KIDOLGOZOTT  
ESZPERANTÓ  
TÉMALISTA**

**Debrecen 2018**



**© Dr. Salga Attila**

**Debrecen 2018**

## SALGA ATTILA

# KIDOLGOZOTT ESZPERANTÓ TÉMALISTA

A bizottság előtti szóbeli eszperantó vizsga tételhúzással kezdődik.

a) Témakártya választása. A/5-ös lapon négy téma szerepel.

b) Képleírás. Két képből egyet kell kiválasztani.

c) Szituáció húzása.

A vizsgáztató a témakártya négy feladatát összehasonlítja a kép és a szituáció témájával. Egyezés esetén csak a másik kettőt kérdezheti. Ha nincs hasonlóság, akkor szabadon dönt, hogy a négyből melyik kettőt kéri számon. A hallgató ebből nem érzel semmit.

Az alábbi összeállítás a témakártyák anyagát dolgozza fel több változatban. A címek alatti magyar nyelvű kérdések csak ötletet adnak a vizsgáztató számára, tehát nem kötelezőek.

Mivel már a tételhúzáskor elindul a diktafonos felvétel, a vizsga első részére az előírt öt percből csak maximum 3-4 jut. Ennyi idő alatt kell a vizsgáztató által megjelölt két témát „megtárgyalni”. Ebben a jegyzetben a témakörök kidolgozása általában rövid, és a kis monológok több szempontból válaszolnak a tanár által feltehető kérdésekre.

Minden témakörből elegendő egyet-kettőt választania és bemutatnia.

A választás szubjektív.

NEM KELL,

- mert hosszú,
- sok benne az ismeretlen szó,
- nem értem.

KELL,

- mert rövid,
- könnyen megtanulható,
- értem,
- más témákkal is összefügg.

Az ONYC által közölt témák között gyakran vannak átfedések. Ez azt jelenti, hogy egy-egy megtanult szöveget több helyen is felhasználhat.

A vizsga ideje 3 x 5 (= 15) perc.

## **1A) CSALÁD, ROKONOK, BARÁTOK, GENERÁCIÓK**

Mutatkozzon be. Beszéljen a rokonairól. Milyen gyakran és milyen alkalmakkor találkoznak?

Milyen előnyei és hátrányai vannak több generáció együttélésének?

### **Generacioj 1**

Mi loĝas kun miaj gefiloj kaj edzo. Niaj gefiloj obeas nin (szót fogadnak), ni ne havas generaciajn problemojn. Ofte ni diskutas (vitatkozik), se ni havas diferencojn en niaj opinioj (véleménykülönbség), sed poste ni konsentas (megegyezik). Ni estas tre feliĉaj, ke ni povas loĝi kune.

### **Generacioj 2**

Nia familio konsistas el miaj gepatroj edzo kaj gefiloj. Mia patrino havas 70 jarojn, kaj mia patro estas 73 jara. Ofte ili kritikas nin, ĉar ni ekskursas, somere ripozas ĉe la maro aŭ Balatono. Ili estis malriĉaj, kaj neniam ili povis somerumi. Ili ne povis travivi (átél) la belegan senton de libereco, trankvileco, refreŝiĝo dum libertempo. Tamen ili estas pacemaj, kaj ili komprenas, ke nia generacio pensadas alimaniere, ni estas modernaj.

### **Parencoj**

Mi havas kelkajn parencojn: du geavojn, du gefratojn, ses gekuzojn. Kompreneble kun miaj gefratoj mi renkontiĝas ĉiutage. Mi povas renkonti aliajn malofte – Kristnaske, Paske, naskiĝtage kaj nomtage. Ni estimas unu la alian. Ni ŝatas helpi unu al la alia, se ni havas tiujn problemojn, kiujn ni ne povas solvi memstare (önállóan).

### **1B) ÜNNEPEK, HAGYOMÁNYOK**

Melyik a legkedvesebb ünnepe és miért?

Milyen egy átlagos vasárnap az Ön családjában?

#### **Kristnasko**

Kristnasko estas la festo de la amo, feliĉo, familioj. En Hungario Kristnaske oni dekoras (díszítenek) pinojn (fenyőfákat). Oni pendigas (akasztanak) bonbonojn, ĉokoladetojn en ornamitaj paperaĵoj (díszes papírban), krome oni pendigas globetojn el vitro (üvegdíszek), bakaĵetojn (kis sütemények) ktp.

Oni donacas diversajn aĵojn unu al la alia.

Je la Kristnasko mi ricevis de miaj gepatroj biciklon, poŝtelefonon (mobiltelefon) kaj fotoalbumojn. Mi donis al ili littolaĵojn (ágynemű), garnituron de tetasoj (teáskészlet) kaj kafokuirilon (kávéfőző). Mi donacis valorajn librojn al miaj gefratoj, kaj mi ricevis vestaĵojn de ili. Ni estis tre feliĉaj kaj gajaj.

#### **Silvestro – Nova Jaro**

Oni tre ŝatas festotagojn, ĉar tiam oni ne devas labori.

Dum la lasta tago de la jaro plej multaj hungaroj rigardas televidprogramojn, dume ili trinkas vinon, kaj noktomeze ĉampanon. Oni tintas glasojn da ĉampano (koccintanak egy pohár pezsgővel) je la nova jaro, la novaj sukcesoj (az új évre, az új sikerekre). Kelkaj homoj promenadas sur la stratoj, trumpetas (trombitál), kriadas, dancas, surhavas maskojn (álarc), piroteknikaĵas (petárdáznak).

#### **Pasko**

En Hungario fraŭloj, knaboj kaj sinjoroj vizitas parencinojn, konatinojn por spruĉigi (locsolni) ilin per parfumo, odekolono (kölni), akvo. Laŭ tradicioj tiam virinoj estos sanaj, gajaj, puraj kaj gravedemaj (termékenyek). Ili gastigas virojn, donas al ili donacojn: veraĵn, koloritajn (festett) ovojn (tojásokat); al knaboj ili donas ĉokoladajn ovojn kaj monon.

Mi tre ŝatas tiun grandan feston.

## La 20-a de Aŭgusto

Tiam estas la nomtago István (Stefano). Nia unua reĝo estis Stefano, kiu poste iĝis Sankta, ĉar li kaj la hungaroj akceptis (elfogadták) la kristanisman. La 20-an de Aŭgusto ni festas lin, lian memoron. Tiutage estas la festo de rikolto (aratás). Tiam en Debrecen oni aranĝas (rendeznek) florkarnavalon; tie kaj en aliaj komunumoj (település) okazas piroteknikaĵoj (tűzijáték).

## Naskiĝtago

Naskiĝtago estas granda festo en familioj. Ĝi estas nur foje ĉiujare. Familianoj kaj geamikoj gratulas tiun, kiu festas sian naskiĝtagon. Li/ŝi ricevas diversajn donacojn, ekzemple valorajn librojn, poŝtelefonon (mobiltelefon), florojn, vestaĵojn, tekokomputilon (laptop) ktp. Tiam la familianoj manĝas bongustajn manĝaĵojn: farĉitajn brasikojn, fiŝsupon, gratenitan fiŝaĵon, desertojn, torton, bakaĵojn. Ili trinkas bieron, ĉampanon, vinon, konjakon, palinkon. Oni diras, ke oni devus havi kelkajn naskiĝtagojn ĉiujare.

Kelfoje okazas, ke oni donacas eskterlandan vojaĝon al tiu, kiu festas sian naskiĝtagon. Laŭ mia opinio tio estas tre utila ebleco.

## Nomtago

Kelkaj homoj havas nomtagon ne nur unufoje, sed kelfoje. Nomtage oni donacas librojn, vestaĵojn, bukedojn da floroj (virágcsokrokat), eĉ biciklojn, televidilojn. Oni povas festi en restoracioj kaj manĝi bongustajn hungarecajn manĝaĵojn. Mi havas nomtagon la ...-an de ..... Lastfoje mi ricevis de miaj gepatroj poŝtelefonon kaj kostumon (kompleton).

## Geedziĝo, geedziĝa festo

Kiam junulo kaj junulino tre amas unu la alian, ili volas kunligi (összekötni) sian vivon poreterne (örökre), ili geedziĝas ĉe matrikulisto (anyakönyvvezető) kaj en preĝejo. Ili respondas laŭtan „jes”, kiam la pastro /matrikulisto demandas ilin pri sia serioza decido (komoly elhatározás). Dum la festo ĉeestas (jelen vannak)

gepatroj, geavoj, gefratoj, gekuzoj, geamikoj kaj aliaj. Poste sekvas longa manĝado, trinkado, dancado, amuziĝo. La novbakita (újdonsült) geedza paro vojaĝas al nuptovojaĝo (nászútra).

Nia geedziĝa festo estis antaŭ dek jaroj. Ni estis tre feliĉaj kaj gajaj. Ni nuptovojaĝis al Venecio (Velenec).

### Ĝenerala semajnfino 1

Sabate kaj dimanĉe mi ne laboras, do mi povas pasigi la semajnfinojn kun miaj familianoj. Mi ellitiĝas je la oka horo. Mi matenmanĝas abunde (bőségesen), ĉar mi ne rapidas. Niaj familianoj estas tre feliĉaj, ĉar ni povas pasigi la tempon kune kaj agrable. Mia edzino kuiras, fritas, niaj gefiloj ludas, retumas (neteznek) aŭ televidas. Mi kutimas helpi al mia edzino en la preparo de la manĝaĵoj: volonte mi senŝeligas terpomojn (krumplit hámozok), muelas viandon (húst daráló), lavas telerojn, deĵoras (felügyelek), kiam ŝi gladas (vasal) dum kuirado ktp. Ĝenerale ni tagmanĝas je la 12a horo kaj 30 minutoj. Posttagmeze mi rigardas sportprogramojn, futbalmatĉojn, interparolas kaj kartludas kun miaj gefiloj. Kelfoje ni vizitas kinejon; somere, kiam la vetero estas bona, ni vizitas strandon. Vespere ni ellitiĝas je la 10a horo. Ĝenerale mi ne sonĝas (álmodom), sed kelkfoje mi vidis terurajn (szörnyű) situaciojn, en kiuj oni persekutis (üldöztek) min, kaj mi ne povis rifuĝi (elmenekülni).

### Ĝenerala semajnfino 2

En nia urbo ekzistas kelkaj diskokluboj. Semajnfine mi ŝatas viziti ilin. Vendrede vespere mi kaj miaj geamikoj kunvenas, kaj ni ekiras al iu diskoteko. Tie dancas multaj gejunuloj. Bedaŭrinde la muziko estas tre laŭta.

Mi ŝatas danci kun mia amikino, kies nomo estas Ági. Ĝenerale ni restas tie ĝis noktomezo.

Sabate mi dormas ĝis la deka horo. Post la matenmanĝo mi preparas min al la studhoroj. Mia patrino kuiras bongustajn manĝaĵojn. Niaj familianoj tagmanĝas kune.

Posttagmeze mi lernas aŭ rigardas televidprogramojn, vizitas kinejon kun mia amikino.

Dimanĉe ripozante kaj aŭskultante muzikon, mi lernas, poste mi promenas kun nia hundo Cézár en la parko.

Mi tre bedaŭras, ke la tempo flugas rapide. Kiam mi enlitiĝas je la deka vespere, mi pensas pri la sekvonta, longa semajno.

## Ĝenerala semajnfino 3

Semajnfine ofte ni ekskursas al la montaro Bükk, kie ni enspiras (belélegzünk) freŝan aeron, kuras, futbalas kaj ĝuas (élvezzük) la belecon de la naturo.

Pasintfoje mi vizitis Eger, kiu famas pri fortikaĵo, minareto, vinoj, belega, historia urbocentro.

Vintre semajnfine ni kutimas skii en Bánkút kaj Kékestető. Semajnfine ni estas tre feliĉaj kaj gajaj, ĉar niaj familianoj povas pasigi la tempon kune kaj agrable.

## Nomtago 2

Kiam mi havas nomtagon, miaj familianoj gratulas min. Mi ricevas donacojn. Lastfoje mia edzo donacis al mi oran ringon, kaj mi tre ĝojis pri ĝi.

## Naskiĝtago 2

Okaze de mia naskiĝtago niaj familianoj tagmanĝas en restoracio. Ni mendas (rendel) diversajn, bongustajn manĝaĵojn, trinkas ruĝan vinon, kaj ni fartas tre bone.

## Florkarnavalo en Debrecen

La 20-an de aŭgusto estas festo de la plej granda hungara reĝo, Stefano la Sankta. Li estis la fondinto de nia kristana lando.

Tiutage en Debrecen oni organizas florkarnavalon, kiun rigardas cent-ducent mil enlandaj kaj eksterlandaj turistoj.

Mi tre ŝatas la karnavalon, kiam dum 2-3 horoj mi povas ĝui (élvezni) 10-14 ornamitajn (feldíszított) trafikilojn, ĉarojn. Ili estas faritaj el po tricent-sescent mil da floroj.

Ili ilustras diversajn figurojn, personojn de nia historio, nuna tempo: la sanktan kronon (szent korona), ĉevalojn kun ĉevalistoj, ŝafojn kun ŝafistoj, aŭtojn, baskulputojn – ĉio estas farita el sekigitaj (szárított) kaj veraj (igazi) floroj. Tiam rolas (szerepelnek) diversaj orkestroj, ensembloj, popoldancistoj, majoretaj grupoj, kiuj venis el diversaj landoj kaj el Hungario.



## 2A) LAKÓHELY, LAKÁS, HÁZIMUNKA

Miért szereti lakóhelyét? Mit változtatna a lakásában, ha megtehetné?  
Hogyan osztják meg a házimunkát? Miért?

### Debrecen

Debrecen estas la dua plej granda urbo en Hungario.

En ĝi loĝas ĉirkaŭ 230 mil da loĝantoj.

Ĝi estis dufoje la ĉefurbo de Hungario: en 1849 kaj 1944.

### Ĝiaj vidindaĵoj estas:

- ✓ Granda Kalvinana Preĝejo
- ✓ nova kaj malnova urbodomoj
- ✓ Muzeo Déri
- ✓ Katedralo Anna la Sankta
- ✓ grekokatolikaj kaj romkatolikaj preĝejoj
- ✓ sinagogo
- ✓ Hotelo Ora Taŭro (Aranybika)
- ✓ strando
- ✓ kuracbanejo
- ✓ diversaj monumentoj
- ✓ Granda Parkarbaro
- ✓ zooparko
- ✓ la dua plej granda universitato en Hungario
- ✓ botanika ĝardeno
- ✓ Kalvinana Kolegio
- ✓ Kalvinana Universitato
- ✓ malnova urbodomo
- ✓ moderna urbocentro
- ✓ florkarnavalo
- ✓ stadiono Főnix
- ✓ stadiono Hódos
- ✓ teatro Csokonai
- ✓ Kulturcentro Kölcsey
- ✓ Akvatiko ktp.

### **Miskolc**

Miskolc estas la tria plej granda urbo de Hungario. Ĝi situas en la nordorienta parto de nia lando. Ĝi havas ĉirkaŭ ducent mil loĝantojn.

Ĝiaj vidindaĵoj estas: Universitato kun studenthejmoj kaj belegaj parkoj, Muzeo Otto Herman, galerio, belvidejo sur monteto Avas, diversaj hoteloj, Popolparko, monumentoj, grekokatolikaj, romkatolikaj kaj kalvinanaj preĝejoj ktp.

En urboparto Diósgyőr troviĝas fortikaĵo kaj sovaĝbesta parko.

En urboparto Lillafüred oni povas ripozi en Hotelo Palaco, rigardi lageton, akvofalon (vízesés) kaj kavernojn (barlang).

En la proksima urboparto Tapolca troviĝas belega parko kaj kuracbanejo Kaverno. Tie oni povas kuraci sin, baniĝi, naĝi, sunumi.

### **Avantaĝoj de vilaĝoj**

Mi loĝas en vilaĝo ... Mi ŝatas loĝi tie, ĉar la aero estas freŝa, ĝiaj loĝantoj estas amikemaj, simpatiaj, laboremaj. Ili helpas unu al la alia. Tie loĝas miaj konatoj, amikoj, familianoj kaj parencoj. Ni povas kontaktiĝi ofte kaj rapide.

Nia vilaĝo evoluas kontinue (folyamatosan), kaj la interurba trafiko estas fidinda (megbízható). Oni povas atingi la proksiman urbon rapide per trajnoj aŭ aŭtobusoj.

En mia vilaĝo oni povas bredi (tart, tenyészt) dombestojn: porkojn, kokinojn, bovojn, ĉevalojn. Ni havas kelkajn kokojn kaj kuniklojn (házinyúl).

Mi estas kontenta pri nia domo. Ni aĉetis ĝin antaŭ tri jaroj. Ni devis renovigi la koridoron kaj la antaŭĉambron.

### **Avantaĝoj de urboj**

En urboj oni povas viziti teatron, kinejon, muzeon, galerion, koncertojn, sportaranĝojn (sportrendezvények). La loka kaj la interurba (távolsági) trafiko estas fidindaj (megbízható).

Mi estas kontenta pri mia urbo. Tie loĝas miaj familianoj, amikoj, parencoj kaj kolegoj. Tie estas grandaj magazenoj Tesco, Aldi, Penny, Coop, kie mi povas aĉeti ĉion, kio estas bezonata (amire szükségem van).

### **Mi estas malkontenta**

Mi estas malkontenta pri nia domo, ĉar ĝi estas malgranda. Sekvontjare ni volus renovigi kaj larĝigi (kibővíteni) ĝin, por ke ĝi fariĝu 100 kvadratmetra. La

projekto (terv) jam estas preta; ni dezirus preni krediton (hitel) de iu banko por la rekonstruado (felújítás). Mi esperas, ke poste ni povos repagi tiun altan sumon al la banko.

### **Labordivido**

Preskaŭ ĉiuj viroj pensas, ke virinoj devas purigi loĝejon, ŝuojn, polvosuĉi tapiŝojn, lavi vestaĵojn, telerojn, kuiri, friti, baki rosti, varti (nevel) gefilojn, kudri, stebi. Viraj „taskoj” estas legado de gazetoj, ĵurnaloj, libroj, televidrigardado, trinkado de biero kaj hejma ripozado. Tio estas granda miskompreno (félreértés).

En nia familio ekzistas labordivido (munkamegosztás) ekde multe da jaroj. Mia edzo veturigas niajn gefilojn al la infanĝardeno (kaj matene kaj posttagmeze fine de sia laboro). Li havas tempon por aĉetadi, laboreti en nia ĝardeno. Ofte li helpas al mi lavi telerojn, kaj ĉiam li estas kara, tolerema. Niaj gefiloj lavas siajn vestaĵojn memstare (önállóan), purigas siajn ĉambrojn, du-trifoje semajne ili preparas al ni matenmanĝon.

Tiu labordivido helpas havi pli multe da libera tempo, kiun ni povas pasigi kune. Ni vizitas kinejon, teatron, ekspoziciojn (kiállítás), ofte ni ekskursas.

Tiu vorto „labordivido” povas helpi en la solvo de diversaj problemoj, faciligi, nian geedzan vivon (házasélet). Tiel nia vivo fariĝas pli sentoriĉa (érzelemileg gazdagabb), agrabla kaj tolerebla.

### **Loĝejo, domo**

Mia loĝejo (domo) estas meblita moderne. Ni komencis modernigi ĝin antaŭ du jaroj. Ĝis tiam ni havis malnovajn tablojn, seĝojn, ŝrankojn, sed daŭre (folyamatosan) ni aĉetadis novajn meblojn. Ni ŝparis monon, kaj aĉetis necesajn meblojn. Ni devos ŝanĝi ankaŭ niajn tapiŝojn en tiu jaro. Ni volus rekonstrui nian domon. Ni devas ekhavi sufiĉe da mono (elég pénz) por realigi (megvalósít) tiun planon (terv).

Eble mi ricevos krediton de iu banko. Je feliĉo mia bopatro laboras kiel masonisto (kőműves) kaj farbisto (szobafestő). Li povas helpi multe al ni.

## **2B) LAKÓKÖRNYEZET, SZOMSZÉDOK, NEVEZETESSÉGEK**

Beszéljen a településről/környékről/utcáról, ahol él.

Mutassa be lakóhelyének legszebb/legérdekesebb részét/nevezetességeit.

### **Pri nia strato**

Apud nia strato kreskas altaj arboj, kiuj ombrigas (beárnyékolják) ĝin. Proksime estas la urbodomo (vilaĝdomo), du grandaj magazenoj. La trafiko (forgalom) estas malvigla (gyér), do la aero estas pura kaj freŝa. Neniam mi pensis, ke iam mi povas loĝi en tiu belega, moderna ĉirkaŭaĵo, kaj nun mi estas feliĉa. Ni translokiĝis el urbo (vilaĝo).... antaŭ du jaroj.

Miaj gepatroj kaj geavoj loĝas proksime. Mia plej bona amiko loĝas en la najbara strato. Ni renkontiĝas ofte.

### **Pri nia domo**

Mi loĝas en familia domo en urbo Hajdúböszörmény. Nia loĝejo konsistas el sekvaj ejoj: tagĉambro, dormoĉambro, du infanĉambroj, kuirejo, banĉambro, necesejo kaj koridoro.

En nia kuirejo estas tablo, kiun ĉirkaŭas ses seĝoj. Tie troviĝas gasfajrujo kaj fridujo, krome diversaj kuirvazoj. Meze de la loĝoĉambro staras tableto kun du foteloj. Dekstre estas kanapoj, maldekstre estas bretoj. Sur la bretoj staras libroj. Miaj libroj temas pri poemoj, noveloj, romanoj. Mia libraro enhavas (tartalmaz) enciklopediojn, mapojn kaj leksikonojn. Apud la bretoj estas ŝranko. Sur la ŝranko staras televidilo, altfidela muzik-komplekso, videoaparato, radio, multaj ĉambrokreskaĵoj (szobanövény).

### **Ni ŝanĝis loĝejon**

Ni ŝanĝis loĝejon, kiu troviĝas en la kvina distrikto (kerület). Bedaŭrinde ĝi ne estas nova. Ĝi estis konstruita antaŭ dudek jaroj. En ĝi estas du ĉambroj, malgranda kaj mallonga koridoro, banĉambro kun necesejo, kuirejo, salono kaj manĝajkamero.

Mia edzo kaj mi devos voki diversajn specialistojn (entreprenistojn) por plenumi faklaborojn kaj renovigi nian loĝejon.

Laŭ mia opinio murfarbisto (szobafestő) devos tapeti du ĉambrojn kaj la koridoron. Bedaŭrinde tio kostos multe.

Nun ni loĝas ĉe miaj bogepatroj ĝis julio. Ni devos labori multe, tamen ni estas tre feliĉaj.

### **Aĉeteblecoj**

En nia komunumo (település) ekzistas riĉaj aĉeteblecoj (bevásárlási lehetőség). Proksime al nia domo troviĝas du grandaj magazenoj (superbazaroj) TESCO kaj Penny. Mi tre ŝatas aĉeti tie, kiam oni donas rabaton (kedvezmény).

### **Ĉu tie estas vidindaĵoj?**

Mi loĝas en malgranda vilaĝo, kie ne troviĝas famaj vidindaĵoj. Mem la katolika templo en baroka stilo estas interesaĵo. Por niaj vilaĝanoj gravaj renkontiĝejoj (fontos találkozási helyek) estas drinkejo (italbolt), sukeraĵejo (cukrászda), futbalejo, magazenoj, ŝuriparejo (cipőjavító), poŝtoŭfice, kuracista atendejo (orvosi rendelő), vendohalo (piac).

### **Balmazújváros**

Nia urbo Balmazújváros havas 20 mil loĝantoj. En la centro de nia urbo troviĝas la kastelo de Semsey kun memormuzeo.

En la ĝardeno de la kastelo estas kuracbanejo, kies akvo egalas al la kuracforto kaj kuracelementoj de la banejo en Hajdúszoboszló.

Multaj turistoj vizitas nian urbon, ĉar ĉi tie naskiĝis la fama hungara verkisto Péter Veres kaj la artisto Imre Soós.

La memormuzeo pri Péter Veres troviĝas najbare al la domo de niaj geavoj en la strato Kadarcs.

Somere oni organizas diversajn programojn. Ekzemple, meze de aŭgusto oni aranĝas muzikvesperojn en la kastelo. Blovmuzik-orkestroj renkontiĝas kaj konkuras. La unuan de majo oni organizas memorbiciklan konkuron (emlékverseny).

### 3A) FOGLALKOZÁS, MUNKAHELY,

#### KOLLÉGÁK

Beszéljen foglalkozásáról és munkájáról (feladatok, kollégák, munkahelyi légkör).

#### **Agrabla etoso**

Mi laboras en banko kiel kasistino. Dum mia laboro mi fartas bone. Mi surhavas belan uniformon. Mia laboro komenciĝas je la 7a kaj duono. Mi veturas al mia laborejo per mia aŭto. Mia laboro estas kompleksa, kiu postulas (követel) multe da atento (figyelem), pacienco (türelem). Miaj koleginoj helpas al mi, se mi havas problemojn. Mi laboras en agrabla etoso (légkör, hangulat).

#### **Malagrabla etoso**

Mi laboras kiel instruisto pri matematiko. Dum mia laboro kelkfoje mi fartas malbonete, ĉar mi sentas, ke miaj gekolegoj estas ĵaluzaj (féltékenyek), enviaj (irigyek). Laŭ mia opinio la lernantoj tre ŝatas min, ĉar mi instruas ne nur la lernomaterialojn, sed sukcesajn lernometodojn (tanulási módszerek). Mi okupiĝas pri la lernantoj post la lernohoroj, sed miaj kolegoj havas familiojn, kaj ili ne havas liberan tempon por fari tion. Mi laboras en malboneta etoso.

#### **Mia laborejo 1**

Laŭ mia opinio mia laborejo estas ĉefe ne en la bazlernejo, sed en la klasejo mem, kie mi gvidas lernohorojn. Mi fartas bone nur en la klasejo, kie la lernantoj aŭskultas min. Ni kalkulas, legas, desegnas, mi klarigas al ili la lernomaterialon.

#### **Mia laborejo 2**

Mi laboras kiel sekretariino (titkárnő). Mi helpas la laboron de nia ĉefo. Mi tajpas (gépeli) leterojn, protokolojn (jegyzőkönyvek), kuiras kafon ktp.

#### **Mia kolegino**

Mia plej bona kolegino sidas apud mi dum mia labortempo. Ni povas priparoli (megbeszél) la problemojn, ofte ni solvas ilin kune. Ŝi estas inteligenta, kara. Post laboro ofte ni vizitas unu la alian, tio signifas, ke ni estas bonaj amikinoj.

### **3B) OTTHONI, ISKOLAI, MUNKAHELYI NAPIREND**

Ön korán kelő vagy későn fekvő típus? Mikor kezd és fejezi be a munkát?

Szeretne-e ezen változtatni? Mi lenne az ideális?

Hogyan tölti a hétvégéket? Szokott-e hétvégén tanulni/dolgozni?

Mi a véleménye a hétvégi tanulásról/munkavégzésről?

#### **Tagordo 1**

Ĝenerale mi vekigās ĉirkaŭ je la kvina horo labortage. Mi iras en la banĉambron, kie mi purigas miajn dentojn, lavas min, viŝas min, vestas min. Mi manĝas roŝtpanon. Mi trinkas verdan teon aŭ nigran kafon. Mi veturas al mia laborejo per nia aŭto. Mi tagmanĝas inter la 12a kaj la 13a horo en mia laborejo. Post laboro ĉirkaŭ je la kvara horo mi veturas hejmen. Mi okupiĝas pri mia edzo, mia filino, kuiras vespermanĝon, televidas. Mi interparoladas kun miaj familianoj pri ĉiutagaj aferoj (hétköznapi dolgok). Mi banas min ĉirkaŭ je la naŭa horo. Mi enlitiĝas je la deka horo.

#### **Tagordo 2**

Mi estas kontenta pri mia tagordo. Tamen se mi povus ŝanĝi ĝin, mi atingis pli multe da libera tempo por aktiva ripozado kaj dormo. Bedaŭrinde mi ne havas tempon por sporti. Se mi povus sporti, mi povus kompili (összeállítani) idealan tagordon por mia bonstato.

#### **Tagordo 3**

Mi laboras de la oka ĝis la kvara. Mi devas ellitiĝi frue, ĉar mi devas veturi al mia laborejo du horojn. Post mia laboro mi veturas hejmen, kie miaj familianoj atendas min. Mi devas kuir, friti ion, poste lavi, gladi, purigi, polvosuĉi. Je feliĉo (szerencsére) mia edzo kaj miaj gefiloj helpas multe en la hejma laboro.

Festotage miaj familianoj intencas (szándékoznak) plifaciligi (megkönnyíteni) mian laboron. Ili helpas al mi purigi nian loĝejon, lavi telerojn. Ni rigardas televidprogramojn kune.

## Semajnfine 1

Semajnfine mi devas labori en nia ĝardeno, purigi nian loĝejon, kuiri. Krome mi devas/devis lerni Esperanton, prepari min al la studhoroj en la universitato.

## Semajnfine 2

Laŭ mia opinio oni ne devas labori semajnfine. Ekzistas aktiva kaj pasiva ripozo. Kiam oni dormas, sidadas hejme sencele (cél nélkül), televidas, trinkadas bieron, tiam oni ripozas pasive. Ripozi aktive, tio signifas sporton (futbalon, kuradon, naĝadon, tenisadon, tablotenisadon), laboron en la ĝardeno, ekskurson, vojaĝon al eksterlando.

## Semajnfine 3

Ofte mi plendas (panaszodom) pri la manko (hiány) de libera tempo. La plej grava problemoj estas, ke dum mia laboro mi tre laciĝas (elfáradok). Sabate kaj dimanĉe mi ne laboras, kaj mi povas ripozi iomete (egy kicsit).

Mi legas la gazetojn, kiujn mi ne povis legi labortage. Mi manĝas abunde (bőségesen), ĉar labortage mi kuregas (rohanok), dormas pli longe ol alitempe (máskor), interparolas kun miaj familianoj, babiladas (csevegek) kun miaj amikoj pri la futbalo, virinoj, vojaĝoj kaj niaj gefiloj.

## Hodiaŭ

Hodiaŭ mi vekiĝis (felébredtem) je la kvina horo. Mi ellitiĝis (felkeltem) post kelkaj minutoj. Poste mi demetis (levetettem) mian piĝamon, duŝis min (zuhanyoztam). Mi viŝis min (megtörölköztem). Mi vestis mian hejman vestaĵon. Mi trinkis fortan, dolĉan, nigran kafon kun kremŝaŭmo (tejszínhab). Mi manĝis panon kun butero. Poste mi kombis min (megfésülködtem), kaj mi vestis tiujn vestaĵojn, kiujn mi survahas nun.

Mi veturis per nia aŭto. Mia patro (edzo) stiris (vezette) la aŭton.

Mi alvenis antaŭ kelkaj minutoj (antaŭ du horoj, antaŭ duonhoro). Nun mi ekzameniĝas.

Mi fartas bone, ĉar mi ne estas malsana, tamen mia koro (szívem) batas (üt, ver) pli rapide kaj pli forte ol alitempe (mint máskor).



## **4A) ISKOLA, TANTÁRGYAK**

Szeret/ett/-e iskolába járni és miért (nem)?

Meséljen kedvenc tanáráról/tantárgyairól.

### **Mi ŝatis viziti lernejon**

Mi ŝatis viziti lernejon, ĉar mi havis konkretan celon: lerni plu en gimnazio, kaj poste en universitato. Mi finis la infanpedagogian fakon en Hajdúböszörmény. Mi estas feliĉa, ĉar mi ŝatas mian profesion.

### **Mi ne ŝatis viziti lernejon**

Nun mi laboras kiel inĝeniero, kaj eble estas interese, ke mi ne ŝatis viziti bazlernejon. Tiam mi ne povis klarigi (megmagyarázni) ĝian kaŭzon (ok), sed nun mi jam scias. En mia familio neniu instigis (ösztönzött) min lerni, kaj mi ne lernis diligente. Tamen, kiam mi vizitis mezlernejon, mi ekŝatis la lernohorojn, pedagogojn, kaj mi fariĝis (lettem) diligentulo.

### **Miaj ŝatataj lernobjektoj**

Mi lernis en bazlernejo dum ok jaroj, kaj en mezlernejo kvar jarojn. Tie mi ŝatis lerni matematikon kaj fizikon. Laŭ mia opinio ili estas gravaj lernobjektoj en la vivo de ĉiu homo. Oni devas kalkuli kaj koni la leĝojn (törvény) de la naturo, fiziko. Mi fariĝis instruisto de matematiko kaj fiziko.

### **Mia ŝatata instruisto**

Mia ŝatata instruisto instruis la hungaran lingvon kaj literaturon en gimnazio. Li estis tre preciza, akurata, helpema kaj simpatia. Li helpis multe en la lernado. Li montris novajn, efektivajn (hatékony) lernometodojn (tanulási módszerek). De tiu tempo (azóta) mi ŝatas la hungaran literaturon kaj la mondliteraturon. Mi legas librojn regule (rendszeresen).

### **Pri la lernado kaj studado**

Oni devas lerni ĝis morto. Oni komencas lernadi poemetojn de diversaj hungaraj verkistoj en infanĝardeno, bazlernejo. En la lasta tipo de la lernosistemo la lernantoj jam devas okupiĝi pri la bazoj de sciencoj (tudomány), do pri matematiko, kemio, fiziko, hungara lingvo kaj literaturo, fremdaj lingvoj, historio ktp.

La hungara instrusistemo konsistas el infanvartejo, infanĝardeno, bazlernejo, mezlernejo kaj universitato. La studprogramoj ŝanĝiĝas laŭ la progreso de la sciencoj, politiko kaj ŝtato ktp.

Laŭ mia opinio la instruistoj devas transdoni tiujn lerno- kaj studmaterialojn, kiuj estas proksimaj al la vivo, kiujn oni povas uzi sukcese en la laboro, fakoj, profesioj.

### **Lerniga sistemo en Hungario**

En Hungario la eduka kaj lerniga sistemo (nevelési és oktatási rendszer) estas jena: infanvartejo, infanĝardeno, bazlernejo, mezlernejo, universitato.

En Hungario ekzistas du tipoj de mezlernejoj. Fakgimnazio donas nur profesion, gimnazio donas nur abituron.

### **Pri la lernado de fremdaj lingvoj**

Multaj hungaroj laboras eksterlande. Kompreneble ili devas paroli bone tiun lingvon, kiun oni uzas en la konkreta lando. La ĝenerala mondlingvo estas la angla lingvo. Laŭ mia opinio ĝi estas malfacile ellegnebla. Estus pli bone, se ĉiuj parolus Esperanton. Komprebeble tio postulus multe da mono, energio kaj interŝanĝojn en la mondpolitiko.

La unuan fremdan lingvon oni lernas en la bazlernejo. Ili estas ĝenerale la angla, la germana aŭ la franca. Ĉi tiujn lingvojn la lernantoj lernas jam de la kvara klaso ĝis la fino de la gimnaziaj jaroj. En gimnazio la lernantoj devas elekti du lingvojn. Bedaŭrinde ilia pli multo (többségük) ne povas akiri ŝtatekzamenon pri ili.

### **Oni postulas ŝanĝojn**

Oni postulas ŝanĝojn (változásokat követelnek) en la enhavo (tartalom) de lernomaterialoj. Laŭ mia opinio la hungara instrua sistemo (oktatási rendszer) devas doni modernajn sciojn (ismeret, tudás), kiujn la lernantoj/studentoj povas uzi (felhasználni) en la ĉiutaga vivo (hétköznapi élet).

## **4B) TOVÁBBTANULÁS, PÁLYAVÁLASZTÁS**

Hogyan választott pályát? Ki/mi befolyásolta a döntését?

Magyarországon vagy külföldön érdemesebb továbbtanulni és miért?

### **Kaŭzo 1**

Mia patro instigis (ösztönzött) min elekti mian profesion. Li laboras kiel bibliotekisto. En miaj infanaj jaroj mi lernis estimi (tisztel) verkistojn (író), poetojn, librojn, la hungaran literaturon. Mi legis multe, kaj evidentiĝis (nyilvánvalóvá vált), ke ankaŭ mi fariĝos bibliotekisto.

### **Kaŭzo 2**

Jam dum miaj infanaj jaroj mi tre ŝatis kritiki miajn familianojn, amikojn. Mi havis privatan opinion pri ĉio, kaj mi tre ŝatis paroli, interparoladi. Poste miaj gepatroj proponis al mi, ke mi fariĝu ĵurnalistoj, advokato (ügyvéd), prokuroro (ügyész) aŭ politikisto. Mi elektis la profesion de advokato.

### **Kaŭzo 3**

Dum miaj gimnaziaj jaroj mi interesiĝis pri matematiko, sed mi ne volus fariĝi instruisto. Mi elektis la ekonomikan fakon, kaj nun mi laboras kiel librotenisto. Mi tre ŝatas mian profesion. Mi estas kontenta (elégedett).

### **Nur en Hungario**

Neniam mi volis studi en eksterlanda universitato, ĉar mi tre ŝatas Hungarion. Kiam mi vizitis Grekion aŭ Slovakion, mi sentis nostalgion (honnágy). Mia familio, miaj geamikoj loĝas en Hungarujo, mi parolas nur mian gepatran lingvon, do mi ne sopiras (vágyakozik) pri anglaj aŭ germanaj universitatoj. Mi estas feliĉa en Hungario.

### **Eksterlande**

Se mi parolus bone la anglan lingvon, tiam mi ŝatus labori en Anglio. Se mi havus feliĉon kaj sufiĉe da mono (elég pénzem), mi povus studi en iu angla universitato.

## 5A) KOMMUNIKÁCIÓS ESZKÖZÖK

Milyen kommunikációs eszközöket használ és milyen gyakran?  
Milyen hatással vannak az emberi kapcsolatokra a technikai eszközök?

### Interreto

Mi uzas la interreton. Mi havas retadreson. Mi tajpas (gépelek) kaj ricevas multajn leterojn. Mia retadreso estas: [bela.toth@freemail.hu](mailto:bela.toth@freemail.hu) – bela-punkto-heliko-frimel-punkto-hu.

Mi rigardas kaj legas diversajn hejmopaĝojn (weboldalakoj), kaj Esperantajn, kaj ne Esperantajn.

Mi elŝutis (letöltöttem) Esperantajn vortarojn, lingvokursojn kaj tiel plu.

Baldaŭ mi komencos korespondi kun italaj esperantistoj pri diversaj temoj. Bedaŭrinde mi havas malmulte da libera tempo por uzi la interreton.

Mi rigardadas Esperantajn hejmopaĝojn:

eszperanto-punkto-lap-punkto-hu, lernu-punkto-net,  
edukado-punkto-net.

### Poŝtelefono 1

Ĉiuj homoj uzas poŝtelefonojn, ĉar ili devas havi rapidajn informojn pri la interŝanĝoj (változások) en la familia vivo, entreprenoj, komercaj aferoj (kereskedelmi ügyek) ktp.

Oni diras, ke tiu telefonreto estis ellaborite laŭ la komunikado de astronautoj kun siaj direktistoj (irányítók).

Ekzistas diversaj tipoj de poŝtelefonoj: Samsung, Alcatell, Sony Ericsson, Nokia ktp.

Tiuj poŝtelefonoj havas horloĝon, vekhorloĝon, ludojn, kalkulmaŝinon, fotoaparaton, infralumon, diskilon Mo-Po-tri (MP-3), krajondrivelon (angle oni diras „pendrive”) ktp.

### Poŝtelefono 2

Mi tre ŝatas telefoni. Mi ne povas eĉ imagi, kiel homoj povus vivi sen poŝtelefono.

Oni povas facile tajpi leterojn. La komputila koresponda sistemo estas la retpoŝto (angle „email”).

Oni povas aĉeti per poŝtelefono. Ekzistas saĝaj telefonoj. Ili havas specialajn

funkciojn. Ili rekonas (felismerik), kiu kaj kie vi estas, atentigas vin (figyelmeztetnek), sekvas (követnek) vin kaj viajn geamikojn sur mapoj.

### **Poŝtelefono 3**

Poŝtelefono estas ilo, per kiu oni povas paroli, aŭ oni povas sendi mallongajn mesaĝojn (üzenet). Kie ajn oni estas, oni povas telefoni al kiu ajn. La fakso estas ilo, per kiu oni povas sendi originan skriban aŭ maŝinskribitan mesaĝon. Oni povas redakti tekstojn, sendi, legi ilin dum vojaĝo, en ofico, hejme. Saĝa telefono havas lokdifinan sistemon (helymeghatározó rendszer, GPS).

### **Komputila mondo**

Ekzistas tablokomputiloj (PC), tabletkomputiloj kaj tekokomputiloj (angle „laptop”). Ili havas tiujn funkciojn, kiujn posedas saĝaj telefonoj. Oni povas sendi mesaĝojn, retmesaĝojn, redakti tekstojn, interparoli, uzi skajpon, fejsbukon, mendi varojn per interreto, foti, filmi, rigardi filmojn, ludi, veturi laŭ mapoj, organizi minikonferencojn ktp.

### **Tio estas danĝera**

Interreto estas tre grava informilo, tamen ĝi povas esti danĝera por junuloj. Interreto estas virtuala (nevera) mondo, kie geknaboj povas malorientiĝi (eltéved).

Ankaŭ malbonaj homoj uzas tiun sistemon, kie ili ŝajnas (tűnik) realaj personoj, tamen ili estas nerealaj, neveraj, kaj ili trompas (becsap) aliajn.

### **Ne uzu vian poŝtelefonon ofte!**

Ofte geknaboj uzas siajn poŝtelefonojn por ludi, uzi fejsbukon, skajpi, rigardi videofilmojn. Tio estas danĝera afero. La lumo de poŝtelefonoj povas malbonigi, lacigi okulojn, kaŭzi malbonan etoson (hangulat).

Anstataŭ ludado per poŝtelefonaj programoj oni sportu, ekskursu, pasigu liberan tempon varie (változatosan).

## **5B) IDEGEN NYELVEK TANULÁSA, MOTIVÁCIÓ, KÜLÖNÓRÁK**

Mi motivál/hat/ja az idegen nyelvek tanulását?

Mennyire jó az iskolai nyelvvoktatás? Különórákra is szükség van?

### **Motivigo 1**

Nia lingvo ne estas hindeŭropa lingvo, do ni studas eŭropajn lingvojn malfacile. Laŭ mia opinio se oni ne parolas angle, oni ne povas havi bonan profesion kaj perlabori multe (sokat keresni). Studentoj lernas fremdan lingvon por havi diplomon.

### **Motivigo 2**

Motivigaj, instigaj (ösztönző) fortoj kaj emocioj (érzelmek) ludas gravan rolon en la elproprigo (elsajátítás) de fremdaj lingvoj. Ekzemple, mi ŝatas la vivon kaj la kulturon de Anglio, mi volus labori tie. Mi ŝatus perlabori (keres) pli multe ol en Hungario. Mi esperas, ke mi povos komuniki kun eksterlandanoj (külföldiekkel). Mi ŝatus viziti diversajn landojn.

### **Fremdaj lingvoj 1**

Oni devas lerni fremdajn lingvojn en bazlernejo, mezlernejo, tamen ĝenerale oni ne povas atingi sukcesan lingvoekzamenon. Ni vivas en malgranda lando en la centro de Eŭropo, en Hungario. Ni devas lerni fremdajn lingvojn. En gimnazio mi lernis la anglan kaj la germanan lingvojn. Mi devis lerni Esperanton por havi diplomon. Mi lernis ĝin en lingvokurso.

### **Fremdaj lingvoj 2**

Mi havas bonan amikon, kies gepatroj estas lingvoinstruistoj. Li rakontis, ke ili interparolas angle kun li ekde infanaj jaroj, do li povis ekzameniĝi pri la angla lingvo sukcese. Laŭ mia opinio li havas grandan avantaĝon (előny). Nun li lernas la germanan lingvon.

### **Fremdaj lingvoj 3**

Laŭ mia opinio ĝenerale la lernantoj ne povas ellerni fremdajn lingvojn en mezlernejo, ĉar tie ili havas por tio malmulte da libera tempo. Pro tio (ezért) ofte

okazas (előfordul), ke la lernantoj devas havi kromhorojn (különóra), kiuj kostas multe. Ili devas ellerni unu aŭ du fremdajn lingvojn por havi sukcesan priakceptan (felvételi) ekzamenon.

### **Fremdaj lingvoj 4**

Kiu lernas ian fremdan lingvon, tiu devas esti diligenta, persista (kitartó), kuraĝa, scivolema (kíváncsi), decidiĝinta (elszánt, határozott). Se iu ne povas ellerni la anglan aŭ la francan lingvon en mezlernejo, tiu devas pagi por kromhoroj (különórák), kaj tio kostas multe.

### **Fremdaj lingvoj 5**

Kiam oni ne estas motivigataj (motiváltak), oni ne povas ellerni fremdajn lingvojn. Se oni ne decidas kristalpure (kristálytiszta) la celon, oni lernas lingvojn nur kiel studobjektojn. Oni devas esti celorientigaj (célorányosak). Ekzemple mi lernas por havi diplomon, labori en Anglio, vojaĝi multe ktp.

### **Korespondado**

Laŭ mia opinio la plej grava metodo de la uzado de Esperanto estas korespondado.

Mi komencis korespondi per interreto. Mi havas tri korespondamikojn. Ili loĝas en Venecio (Venezia – Italio), Rotterdam (Nederlando) kaj Varsovio (Varsó – Pollando).

Ni interŝanĝas leterojn ĉiusemajne unu aŭ dufoje.

Vincent loĝas en Venecio, kiu estas la simbolo de feliĉaj nuptovojaĝantoj (nászutasok). Mi esperas, ke ankaŭ ni povos viziti tiun belegan urbon.

Maria loĝas en Rotterdam, kie estas la sidejo (székhelye) de UEA (Universala Esperanto Asocio – Egyetemes Eszperantó Szövetség).

Barbara loĝas en Varsovio, kaj ŝi skribas al mi pri siaj vojaĝoj tra la mondo. Ŝi vizitis jam 13 landojn. Ŝi ŝatus viziti Hungarion la trian fojon somere. Mi akceptos ŝin kun granda ĝojo (nagy örömmel).

## **6A) BARÁTI TÁRSASÁG, BARÁTI KÖR MEGVÁLASZTÁSA**

Milyen tulajdonság/ok a legfontosabb/ak egy (új) barátban? Miért?  
Milyen emberekkel (nem) barátkozik szívesen? Miért?

### **Pozitivaj sentoj**

Laŭ mia opinio novaj amikoj (geamikoj) devas esti saĝaj, diskretaj, laboremaj, inteligentaj, bonhumoraj (jókedvű), bonhumuraj (jó humorú), karaj, trankvilaj, gajaj, sinceraĵ (őszinte) kaj toleremaj. La pozitivaj sentoj estas tre gravaj.

### **Negativaj sentoj**

Laŭ mia opinio oni ne devas elekti tiujn geamikojn, kiuj estas maldiskretaj, malkaraj, malgajaj, maltoleremaj, mallaboremaj, malĝentilaj (udvariatlan) kaj malinteligentaj. Ankaŭ la negativaj sentoj estas tre gravaj, kiam oni elektas geamikojn.

### **Miaj amikoj**

Mi havas amikojn, ĉar sen ili mi ne povus ekzisti. Ni preferas la futbalon, kafotrinkadon en sukeraĵejoj (cukrászdák). Mi adoras (imádom) la trankvilajn geamikajn interparoladojn.

### **Miaj amikinoj**

Mi havas kelkajn bonajn amikinojn. Ĉiuj ili estas helpemaj. Ekzemple Marietta gardas (vigyáz) niajn gefilojn tre ofte. Kiam ŝi estas okupata (foglalt), mi ludas kun ŝiaj filinoj. Elvira organizas familiajn renkontiĝojn, Judit donas kuirreceptojn. Enikő havas du hundojn. Ili estas tre amikemaj. Ofte mi promenigas (sétáltatom) ilin. Nun Erzsébet havas problemojn en sia laborejo, do mi donas konsilojn al ŝi. Laŭ mia opinio sen tiuj amikinoj mi ne povus vivi.

### **Miaj geamikoj 1**

Laŭ mia opinio oni ne povas vivi sen geamikoj. Mi havas kvin-ses bonajn amikojn (amikinojn). Kompreneble ni vokas unu la alian per telefono, kaj ni interparoladas pri ĉiutagaj (mindennapi) temoj. Kiam ni renkontiĝas, ni rakontas pri niaj familiaj problemoj, farenadaĵoj (tennivalók). Ni interŝanĝas kuirreceptojn, novaĵojn (hírek). Dume ni trinkadas kolaon, mineralakvon, nigran kafon.



### Miaj geamikoj 2

Ni helpas unu al la alia. Se iuj amikaj geedzoj (baráti házaspár) havas urĝan taskon (sürgös feladat), ili povas lasi siajn gefilojn en alia familio. Ĉiuj ni estas patroj kaj patrinoj, kaj geamikoj – samtempe bebogardistoj, bebogardistinoj (bébiszitterek).

Somere ni ekskursas kune. Ĉi-somere ni vizitis Grekion. En nia grupo estis dek personoj kun niaj gefiloj. Ni fartis tre bone.

### Miaj geamikoj 3

Miaj genajbaroj estas miaj bonaj geamikoj. Tiu familio nomiĝas Szabó. En la familio estas edzo (Károly), edzino (Márta), du gefiloj (Mária kaj Imre). La familiestro (Károly) estas mia plej bona amiko. Li laboras kiel librotenisto en granda entrepreno, kiu okupiĝas pri produktado de nutraĵoj (élelmiszer). Lia edzino estas eleganta, inteligenta, simpatia, parolema, sentema kaj helpema. Mária vizitas la kvinan klason kaj Imre la sepan klason de la proksima bazlernejo. Márta tre ŝatas triki (kötni) kaj stebi (varrni). Ŝi stebis kelkajn robojn al mia edzino. Miaj gefiloj ludas kun Mária kaj Imre tre ofte. Ili preferas kaptoludi (fogócskázni) kaj kaŝludi (bújócskázni). Ni, viroj, adoras (imádunk) interparoladi pri futbalo, vojaĝoj, trinki bieron, rigardadi belegajn virinojn, kiuj promenadas en la parko antaŭ nia domo. La hobbio de mia amiko, Károly estas fiŝhokado. Ofte ni fiŝhokas en najbaraj lagoj, kie ni hokas diversajn fiŝojn.

## **6B) KAPCSOLATTARTÁS RÉGEN ÉS MOST**

Hogyan tartja a kapcsolatot rokonaival/ismerőseivel?

Hogyan változtak meg a kapcsolattartás lehetőségei az elmúlt időkben?

### **Poŝtoĉaro – interreto**

Antaŭ kelkaj jarcentoj trafikis poŝtoĉaroj (postakocsi), kiuj transportis la poŝtaĵojn. Ofte rabistoj rabis ilin. Antaŭ kvindek jaroj oni sendis multe da leteroj kaj bildkartoj per poŝto, kiu veturigis (szállította) ilin per trajnoj, ŝipoj, flugmaŝinoj. Nuntempe oni uzas interreton, kaj oni sendas mesaĝojn, informojn, leterojn, monon dum kelkaj sekundoj.

### **Persona kontaktiĝo**

Laŭ mia opinio persona kontaktiĝo estas la plej efika (hatékony) metodo de informiĝo (tájékoztató) kaj informigo (tájékoztatás). Se la distanco estas granda inter du personoj, oni devas uzi modernajn komunikilojn: poŝtelefonon, skajpon, interreton, retpoŝton (email). Laŭ mia opinio dum la persona renkontiĝo oni povas babiladi pli amike, kare ol per interreto aŭ telefono.

### **Kun miaj geamikoj**

Mi renkontiĝas kun miaj geamikoj malofte, ĉar mi devas labori multe, kaj mi havas malmulte da libera tempo. Ofte ni komunikas per poŝtelefono, fejsbuko, retpoŝto. Ili estas tre modernaj servoj (szolgáltatás) por interŝanĝi novaĵojn, opiniojn kaj planojn.

### **Familianoj**

Kun miaj familianoj mi renkontiĝas ĉiutage, kaj ni povas interparoladi pri diversaj temoj. Niaj ŝatataj temoj estas vojaĝoj, aŭtoj, bestoj, laboro. Kio okazis hodiaŭ, kion ni faros morgaŭ, kien ni veturos somere – ni povas priparoli (megbeszél) ĉiujn komunajn temojn. Se ni ne estas hejme, ni povas kontaktiĝi unu kun la alia per poŝtelefonoj.

## Parencoj

Mi renkontiĝas kun miaj parencoj semajnfine aŭ unufoje monate. Tiam ni povas ŝanĝi novaĵojn, sed alitempe (máskor) ni uzas poŝtelefonon, mi sendas mesaĝojn (úzenet), retpoŝtajn leterojn. Hieraŭ mia fratino invitis min al vespermanĝo, kaj dume ni devos rakonti multe pri mia Esperanta-ekzameno.

## Fejsbuko 1

Kun miaj geamikoj mi uzas Fejsbukon, kaj ni kontaktiĝas kelkfoje ĉiutage. Fejsbuko estas internacia ilo por kontaktiĝo kun geamikoj. Ili povas prezenti fotojn, novaĵojn, priparoli (megbeszél<sup>ni</sup>) problemojn, kunligi (összekapcsol<sup>ni</sup>) kiujn ajn kaj kiam ajn (bárkit bármikor). Mi estas tre feliĉa, kiam mi povas uzi poŝtelefonon kaj aliajn modernajn ilojn por atingi miajn geamikojn.

## Fejsbuko 2

Mi uzas Fejsbukon tre ofte. Ekzemple antaŭhieraŭ mia plej bona amikino malsaniĝis. Ŝi havis altan febron, kapturniĝon. Ŝiaj familianoj kaj parencoj estis eksterlande, neniuj povis helpi al ŝi krom mi. Ni kontaktiĝis kelkfoje. Mi aĉetis febromezurilon (láz<sup>mérő</sup>), medikamentojn, nutraĵojn (élelmiszer). Mi vizitis ŝin, kaj kuiris kamomilan teon, sup<sup>on</sup> el terpomoj (krumplileves).

## Fejsbuko 3

Imagu! Miaj geamikoj interkonatiĝis per Fejsbuko. Ili invitis unu la alian tagmanĝi, viziti kinejon, koncerton, ekskursi. Nun ili estas tre feliĉaj, ĉar ilia geedziĝa festo estos post du semajnoj. Ili invitis ankaŭ min. Do ankaŭ mi estas tre feliĉa.

## Fejsbuko 4

